

Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, eks. prezidanto de la Kulturdomo de Franclingvaj Esperantistoj

JARABONO

Jarabono : 80 fkoj

P. BABIN
Le Haut des Bourrelières
17, rue Romain-Rolland
85100 Le Château-d'Olonne
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61 L

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1994 — 2

(APRILO-MAJO-JUNIO)

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



Raymond Schwartz...





... Kaj Descartes kaj Pascal

KULTURAJ KAJEROJ

Trimonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario : Jeannine VINCENT

26 bis, rue de Milngavie, 49150 BAUGE

Komitatano :

Pierre Babin

ENHAVO

	paĝo
El Gresillon	1
Esperanto tra la Mondo (Frangeul)	2
Raymond Schwartz	3-4
Champollion (fino) - F. Boyet	5-6
Pri du filozofoj - S. Boniol	7-9
Kvizo pri literatura geografio (B. Golden)	10-11
La dervišo rakontas	12-13
Por via distro	14
La Vivo en Gresillon	15-16

El Grésillon

Jam dufoje en la printempo pleniĝis la kastelo. La unuan fojon, komence de aprilo, okaze de la 49-a kongreso de SAT-Amikaro. Tiom plena estis Gresillon tiam, ke ankaŭ en apuda hotelo loĝis kelkaj kongresanoj. Tio ŝajne ne tro ĝenis la disvolviĝon de la kongres-laboro. Estus dezirinde, ke ankaŭ aliaj asocioj, federacioj, grupoj, organizu kongresojn, eĉ simplajn renkontojn, en loko, kiu estis akirita tiucele, kaj kies interno kaj ekstero estas allogaj.

Fine de aprilo, dum la Printempaj Ferioj, kolektiĝis 80 esperantistoj, ĉefe geknaboj aĝaj ĝis 14 jaroj. Pluraj venis el Rusio, Pollando, Hispanio; la aliaj el diversaj partoj de Francio. Nova sukceso ŝuldita al la preparlaboro de Paulette Naulet kaj al la sindonemo de la animantoj. Kompreneble la geknaboj el orientaj landoj ŝuldas sian vojaĝon al Gresillon al la mondonacoj faritaj por tiu celo; la restadon ofertis la Esperanto-Domo.

Kaj la somero? La protokolo de la komitat-kunveno, legebla sur la lasta paĝo de tiu revuo, donas al vi kelkajn informojn. Sed ĝis la lasta momento ni ne povas doni nombron, eĉ proksimumam de aliĝantoj. La listo de kurs-gvidantoj kaj prelegantoj estas tamen alloga. Ĉu vi ne opinias, ke tiom da konataj nomoj ne indigas ĉeeston en la kastelo? Ĉu ili ne estas promeso de serioza lernado kaj praktikado de la lingvo?

****

EN LA MONDON ...

venis nova bebo. Marin elektis la hejmon de Marie-Aline kaj Henri Boyet. Li trovis tie jam du fratinojn, Morgane kaj Madalen. Ni ĉiuj partoprenas en la ĝoja de la ge-patroj kaj de la geavoj.

Esperanto tra la Mondo

NOVA LIBRO DE CLAUDE PIRON- Fine de marto estis oficiale lanĉita la nova franclingva libro de C. Piron: " Le défi des langues", eldonita de konata pariza eldonejo l'Harmattan. La aùtoro analizas funde la babelisman situacion de la socio; li montras la grandegan koston de tiu normale malkontentiga situacio (finance, psike kaj por la justeco inter la popoloj). C. Piron pritraktas la diversajn klopodojn de la socio por solvi la problemojn de internacia komunikado kaj fine proponas jam sukcese eksperimentitan solvon: esperanton.

Por tiuj, kiujn timigus la prezo de la libro (170 ff.) por propaganda celo, ni memorigas la du broŝurojn " Communication linguistique" kaj "L'Europe: au rebours du bon sens", kiuj donas bonan resumon de la tezoj de la aùtoro.

EL RUSIO- Estas rimarkinde, ke malgraù la ege malfacila ekonomia situacio en tiu lando, denove, interesaj libroj estas eldonitaj. Oni anoncas la aperon de "Krimo kaj puno", traduko de la fama romano de Dostojevskij, "La unua amo", romaneto de Turgenev, "Spartako", traduko de la romano de James Leslie Mitchell, "La malica komizo", romano de Wenceslao Fernandez-Florez tradukita de Fernando de Diego.

LOI (Lingve Orientita Instruado), projekto de Akademio Internacia de la Sciencoj de san Marino trovis interesatajn edukistojn en pluraj lernejoj de eksa Sovet-Unio. La projekto celas plifaciligi kaj plirapidigi lernadon de fremdaj lingvoj pere de anticipa lernado de esperanto dum proksimume 100 horoj. La instruistoj bezonas rilatojn kun la eùropaj edukistoj, kiuj instruas ankaù esperanton al lernejanoj. Skribi al: Irina Gonĉarova, a/k 102, RUS-143000, Odincovo - Rusio.

LA HUNGARA TALENTO-LERNEJO- La lernejo "Talento", fondita antaù 5 jaroj, kreita de esperantistoj por pli bona evoluigo de infanoj, interalie per frua lernado de esperanto, donas bonegajn rezultojn. Esperanto estas la unua fremda lingvo, kiun lernas la infanoj, kiel komunikilon en realaj situacioj. Dum trisemajna vojaĝo en junio 1993, en Svislando kaj en Suda Francio, la infanoj multe impresis la ĵurnalistojn kaj la pedagogojn. La lernejo volonte akceptas vizitantajn esperantistojn. Jen la adreso: Fondaĵo Talento, 2041 Budaörs, Pf. 102, Hungario.

UMEA VARBAS- Universala Medicina esperanto-Asocio, kiu grupigas la esperantistojn el la diversaj medicinaj medioj kaj metioj, bezonas pli grandan membraron. Ĝi publikigas "Medicina Internacia revuo", kaj "Medicina Kuriero" kaj organizas internaciajn renkontojn. Ĝi havas fakajn sekciojn: stomatologian, veterinaran. Se vi estas koncernata aù se vi konas koncernatajn esperantistojn, rilatu kun la prezidanto: Dr. Imre Ferenczy, Pf. 143, 9002 Györ, Hungario.

EL ITALIO- En la antaùvidita tempo (fine de 1993), la ministeria komisiono itala pri enkonduko de esperanto en la lernejojn, estis fininta sian laboron kaj prezentis plurajn proponojn al la tiama ministro. Ni vidos, kio okazos sekve de la politikaj ŝanĝoj en Italio.

ESTONTAJ RENKONTOJ- En Bourg-saint-Maurice (Francio), de la 26-a de aùgusto ĝis la 2-a de septembro, aranĝo por la ŝatantoj de la montaro kaj de la naturo. Skribi al: Bernard Bourrut, Avenue de la Tarentaise, 73211 Aime, Francio.

Mez-Eùropa Junulara Semajno, en Triberg (Sudokcidenta Germanio), de la 15-a ĝis la 21-a de aùgusto. Informas: Bernd Finger, Neuhaüserstrasse 152, D-79199 Kirchzarten, Germanio.

KAJ NE FORGESU la diversajn aranĝojn de Esperanto-Domo Gresillon, kaj de la Kvinpetalo, en Bouresse.

ANTAŬ 100 JAROJ NASKIĜIS

Raymond Schwartz

kiu estas konata ne nur pro sia ĉefverko "Kiel akvo de l'rivero", sed ankaŭ pro siaj multaj leĝeraj, ironiaj, spritaj, noveletoj, rakontoj kaj poemoj. Jen unu peco, ne tre konata, aperinta la unuan fojon en "Literatura Mondo" en 1932.

Sendube, ĉiu prenas sian plezuron, kie li trovas ĝin. Kaj finfine oni ne rajtas postuli de homoj, kiuj pasigis la tutan tagon en sensuna oficejo, absorbite ĝis kompleta obtuziĝo en ciferaj operacioj, ke vespere ili altigu sian lacan spiriton al la nivelo de intelektaj distraĵoj.

Durand, Tripont, Septim kaj Naŭmuf estis kolegoj. Ankaŭ amikoj ili estis, sed nur malgraŭvole. Ilin ligis unu al la alia malpli reciproka simpatio ol la hazardo de komuna sorto. En la privata vivo ili diferenciĝis inter si, kiom nur eble pro diverseco de siaj konceptoj kaj karakteroj. Durand estis juna fraŭlo. Li vivis senzorge sed brue. Tripont, familipatro konscianta pri siaj devoj, aplikis senkompate tro rigidan ŝparemon. Krom tio li havis severajn principojn pri la moralo. Septim fanfarone sin proklamis duonfraŭlo; li portis tro videble la malvirtojn de tiu metio. Naŭmuf, la kvara, volonte enfermiĝis en definitivan silentemon. Li estis edzo, malfeliĉa en sia hejmvivo, kaj sciis, ke la grandaj doloroj estas mutaj.

Sed ĉiumatene tiuj kvar sin retrovis jungitaj al la sama tasko en la kontista fako de Asekura Kompanio. Lasinte sian propran personecon ĉe la enirpordego ili fariĝis, en la granda administra maŝino, nur radetoj, kies dentoj aŭtomate kaj sengrince adaptiĝis unuj en la aliaj. La kvar kolegoj portis kune la samajn esperojn, la samajn timojn. Tio proksimigas la homojn ofte pli ol simileco de l'inklinoj.

Ĝenerale ili parolis malmulte. Escepte de kelkaj rimarkoj, kiujn ili devis interŝanĝi pro la senfrota funkciado de l'maŝino, ilia konversacio konsistis ĉefe el banalaĵoj, kiuj - tro ofte ripetiĝintaj - atingis la senefikon de trouzitaj klišoj. La kvaro mem apenaŭ atentis la sencon de tiuj vortoj tro konataj. Nur pro enkrustiĝinta kutimo ĉiu el ili rediris sian rolon, pli aŭtomate ol konscie. Tiel, ekzemple, kiam Tripont ĉiumatene plenŝtopis sian pipon, li senmanke ŝmacis: "Jen la plej bela tago el mia vivo!". Al kio Durand same senmanke respondis: "Ĝi ne estas tre bonodora, via plej bela tago." Kiam Septim, la koketa duonfraŭlo, provis per kombileto reordigi siajn sep harojn, Tripont tre ĝuste, sed ĉiam vane, konsilis:" Provu foje per spongo anstataŭ per kombilo." Kaj kvin minutojn antaŭ la 12-a, tre precize, rigardinte la murhorloĝon, Naŭmuf eliris el sia hermetika silento por konstati, ke " restas ankoraŭ kvin minutoj ĝis bifsteko."

Dum la tuta tago ili tiel disvolvis la senvarian diskon de sia repertuaro. Ĉar ili ne ŝatis eksterkadrajn klopodojn aŭ komplikojn. Eĉ post la laboro, ĉiuvespere, kiam en apuda trinkejo ili ludis kune la adiaŭan glason, ili neniel provis diri ion ne jam centfoje diritan. Tie ili staris ĉe la verŝtablo kaj provis per ĵetkuboj gajni sian aperitivon. La ludo ne havis vigligajn kombinojn. Infane facila, senespere stulta. Sed ni jam konstatis, ke ĉiu prenas sian plezuron, kie li trovas ĝin. Laŭvice ĉiu el ili ĵetis la kubojn kaj kalkulis la poentojn. Kiu trafis malplej, tiu malgajnis. Li pagis por ĉiuj. Estas ĉio. Kaj ekzistis prete mulditaj frazoj por kvitanci la malvenkon de ĉiu. Entute kvar variantoj, depende de tio, ĉu estis Durand, Tripont, Septim aŭ Naŭmuf la paganto. Kvazaŭ instinkte, age kaj parole, ili evitis ĉiun novaĵon. Memstaraj homoj, imagokapablaj, ili refariĝis nur post la disiĝo, kiam ĉiu retroviĝis sola en sia "kunteksto".

Tamen, iun tagon, ili improvizis. Dank'al banala hazardo. Fintrinkinte siajn glasojn, kaj eble pro tio

iom pli entreprenemaj, ili kvarope sin direktis al la proksima stratangulo, kie ili kutimis ĝisrevidumi. Tiam okazis, ke preterpasis du fraŭlinoj, tute ĉarmaj, cetere bonguste, elegante vestitaj. Evidente filinoj el honestaj familioj. Mute, la kvaro interŝanĝis admiran palpebrumon. Nur Septim, la sperta duonfraŭlo aldone klakigis la langon kaj konfesis:" Mi kun certa plezuro karesus tian dorsaĵon". Pro tiu ĉi neatendita, eksterprograma propono la tri aliaj ne tuj trovis respondon. Fine Naŭmuf, kiu malŝatis fanfaronadon, incitis:" Nu faru do se vi kuraĝas." Kaj Septim akceptis la spitinviton: " Kial ne? Vidu!".

Li postsekvis la junulinojn kaj rapide, nenion dirante, li metis sian manon sur la suban dorsoparton de unu el ili, dum liaj kamaradoj, atendante kaj esperante skandalscenon, stulte ridis. Sed fakte okazis nenio. La junulino, tiel subite kaj nekonvene tuŝita, turniĝis tute senkomprene, ne konsciante tuj la malĝentilaĵon. Sed kiam ŝi komprenis, - bedaŭrinde tro malfrue - eklumis en ŝiaj okuloj indignata brilo de ofendita senforto. Tiu rigardo, kvazaŭ helpokrio-signalo de ĉasita cervino, plej dolore tuŝis la konsciencon de Tripont. Li estis mem familipatro, havis du grandajn filinojn, kiuj iam povus troviĝi en simila situacio, elmetitaj al sama gesto de krudulo. Tripont sentis embarason kaj malbonhumore, ĉe la proksima angulo, li forlasis siajn kolegojn.

Li sekvis la saman vojon, kiun iris ankaŭ la knabinoj. Laŭ ilia vigla diskutado li facile konkludis, ke ilia emocio ne kvietiĝis. Tiam li sentis la bezonon peti pardonon pro la senpripensa ago de sia amiko. Li preparis laŭcirkonstancan paroladeton kaj sin turnis al la junulinoj:" Pardonu, fraŭlinoj, mi dezirus..."

Pli li ne sukcesis diri. Li ricevis tian vangofrapon, ke li povis nur froti la dolorantan vangon, dum la sonoro de l'frapo ankoraŭ eĥis en liaj oreloj. Ĉar intertempe la bonfamiliaj filinoj estis adaptiĝintaj al la situacio. Nun ili sciis, kion fari kontraŭ truduloj. Kaj kolera voĉeto avertis:" Ne kuraĝu insisti, impertinentulo!".


Dume, preterpasanto almokis Tripont-on:" Tion vi ne ŝtelis, senbremsa voluptulo!".

Amaŝiĝintaj gapantoj informiĝis: " Kio estas? Kio okazis?" kaj la sola atestanto ne hezitis klarigi: " Tiu perversulo volis perforti la sinjorinojn." Kaj la gapantoj postsekvis Tripont-on ĝis lia hejmo. Ĉiam pli multnombraj ili fariĝis kaj ĉiam pli laŭte ili insultis lin:" Diboĉulo! Senhontulo! Vampiro!" Kaj tiuj estis la plej mildaj epitetoj.

Tripont pli libere spiris nur, kiam li transpaŝis la sojlon de la domo. Fine la kurteno falis, kvankam sur la strato la amaso ankoraŭ murmuris. Tripont sin opiniis savita. Sed li eraris.

Ok tagojn poste li ricevis rekomenditan leteron de la domposedanto, kiu tre energie ordonis, ke li forlasu sian loĝejon antaŭ la fino de l'kuranta monato; ĉar la aliaj samdomanoj, kiuj havis filinojn, minacis fari skandalon, se oni toleras pli longe tian abomenan kaj danĝeran maniulon sub la sama tegmento.

EL LA LIBRO-SERVO DE GRESILLON



CHAMPOLLION
KAJ
la hieroglifoj

Sed Johano Francisko Champollion, kromnomata Champollion la juna, estis malriĉa; li povis studi nur dank'al la apogo de sia frato, kaj ankaŭ la apogo de pluraj scienculoj. Fine, li sukcesis ricevi oficialan mision en Egiption. Li restadis en tiu lando de la somero de 1828 ĝis la aŭtuno de 1829. Li tiam vizitis lokojn en Karnak, Luksor, la valon de la reĝoj en Abu Simbel. De Luksor, li sendis obeliskon al Parizo, kaj tiu obelisko ankoraŭ nun estas en tiu urbo. Spite al tiu sendo, li provis konservigi la arkeologiajn riĉaĵojn de Egiptio...tio okazos poste. En 1831, li fariĝis profesoro pri egiptologio en la fame konata "Kolegio de Francio". Sed li mortis en 1832. Post lia morto, lia frato publikigis du verkojn, kiujn li estis preparinta: egiptan gramatikon kaj egiptan vortaron.

Post la morto de Champollion daŭris la studoj pri hieroglifoj. Kion oni scias nun pri tiu speciala skribo? Mi jam diris, ke kiam la Grekoj konkeris Egiption, la homoj uzis demotikan skribon, kiu iom post iom estis anstataŭata de la greka skribo. Sed, eĉ en la romia epoko, oni konservis la uzon de la hieroglifoj, kiuj malaperis nur pro la trudado de la kristana religio. Tio montras, ke tiuj signoj estis konsiderataj, kiel sakrala ligo inter la homoj kaj la dioj. Krome, la diferenco inter la hieroglifoj kaj la hieratika skribo, kiu ankaŭ estis religia, estis la daŭra konservado de la hieroglifoj, kiujn oni gravuras en la ŝtonoj, kie ili povas rezisti al la fluo de la tempo. La hieroglifoj estis uzataj por la tomboj kaj la temploj kaj oni amase trovas ilin en la malnovaj piramidoj. Ili estis uzataj por montri, ke la faraonoj tenis sian povon de la dioj pro simileco de la simboloj.

Sed studante la amason de tekstoj skribitaj per hieroglifoj, oni konstatis, ke en la plej antikvaj tempoj, tiu skribo ne estis mortinta lingvo konservita nur de pastraro. Per la hieroglifoj oni konis unue la nomojn de la faraonoj, la atributojn de la faraonoj; en la temploj, oni malkovris la nomojn de la dioj, kaj pere de legendoj, kiuj kuniras kun la desegnoj, oni povas eltrovi la teologiajn sistemojn kaj la liturgiajn mekanismojn. Sur la votiloj: statuoj, steleoj, kiujn oni disponis en la temploj, same kiel sur multaj pecoj laŭritaj aŭ kutimaj de la funebraj akompanaĵoj, la egiptoj notis siajn nomojn, la priskribon de sia familio, siajn titolojn kaj per tio oni konas la strukturojn kaj la transformadojn de la socio kaj de ĝiaj institucioj.

Necesas uzi la hieratikan eĉ la demotikan skribojn por atingi, per la papirusa subtenilo, la ĉiutagan vivon de tiu societo. Sed la religiaj tekstoj, kiuj venas de la pastraj bibliotekoj, kaj la funebraj libroj, konfirmas la sciojn donitajn per la surŝtonaj hieroglifoj. Historiaj romanoj, fabeloj pri dioj kaj homoj, moralaj kaj politikaj traktatoj, amaj poemoj, iom post iom estis tradukitaj de la posteŭloj de Champollion. Komercaj dokumentoj, inventarioj, kontistaj dokumentoj, plendoj antaŭ tribunaloj, notariaj pecoj enkondukas nin en burokratan mondon. Tiuj tekstoj estas redaktitaj, laŭ la epokoj, en antikva, meza aŭ nova egipta lingvo, laŭ demotika skribo. Dank'al la legado de la hieroglifoj, oni interesiĝis pri la diversaj skribitaj lingvoj de la egiptoj, kaj trans la mondo de la sakralaj signoj de la hieroglifoj, oni malkovris iun vivantan lingvon, kies evoluon oni pli kaj pli konas.

Nun oni studas la hieroglifojn pere de komputiloj, sed oni konscias, ke mankas al ni multaj informoj pri la vortoj uzataj en la nereligia vivo, ekzemple terminaroj pri la botaniko, pri la teknikoj de tiu epoko. Cetere, la studo de hieroglifoj

estas malfaciligata per la ortografiaj eraroj, kiuj troviĝas en tekstoj skribitaj de lernantoj, kiuj penis rekopii tekstojn same kiel poste faros la monaĥoj, en la mezepoko, pri la latina lingvo. Ekzemple, ekzistas sur la muroj de templo de la epoko de la meza imperio, iu pentraĵo, kiu montras egiptojn kun orientanoj kaj oni krome aludas pri plumba sulfido (galeno). Unue oni komprenis, ke la egiptoj aĉetis la galenon al la orientanoj, sed poste oni komprenis, ke fakte la egiptoj iris ĝis la lando de la galeno, sed revenis akompanataj de la orientanoj. Tiu detalo pri la ankoraŭ ne sufiĉa kono de la egipta lingvo, montras, ke oni ankaŭ multe povas progresi. Fakte, la egipta lingvo de la hieroglifoj estas morta lingvo. Sed ankaŭ mortaj lingvoj estas la latina kaj la antikva greka lingvoj. Sed tamen oni multe pli bone konas la latinajn kaj grekajn kulturojn ol la egiptan; tio pruvas, ke spite al la morta karaktero de tiu egipta lingvo, progresoj eblas.

Kion konkludi pri la graveco de la laboro de Champollion? Unue, dank'al la traduko de la hieroglifoj, oni vere enpaŝis en la mondon de la antikvaj egiptoj. Tio estis la celo de la sciencistoj, kiuj akompanis la militiron de Bonaparte, kaj kiuj raportis la faman ŝtonon el Rozeto. Tio estis la komuna laboro de multaj esploristoj, inter kiuj, mi jam citis la svedon Davido Aokerblado, kaj la anglon Tomaso Jungo. Dum la tuta daŭro de la 19-a kaj 20-a jarcentoj, multaj serĉis, fosante kaj poste tradukante. Sed tamen, la momento, kiam Champollion sukcesis liveri ŝlosilon por pli facile eniri en la misteran mondon de la hieroglifoj, estas memorinda.

Fernand BOYET

Laste aperis

La disertacio "ESPERANTO ET JEUX DE MOTS DANS L'OEUVRE DE RAYMOND SCHWARTZ", verkita de M.TH. Lloancy, estas nun mikroslipigita kaj konsultebla en universitataj bibliotekoj de Francio kaj kelkaj aliaj.

NOVAJ ELDONAĴOJ- "Oni ne pafas en Jamburg", originala romano de Mikaelo Bronŝtejn, en la medio de la junaj sovetaj esperantistoj en la 70-aj jaroj.

Aperis la esperanta traduko de "Rakontoj pri Serajeva sieĝo" de la ĵurnalisto Zlarko Dizdarevic.

"Herbo de la Virgulino", bretonaj rakontoj tradukitaj de F. Le Magadure.

La japana eldonisto "Ludovikito" jam eldonis 47 volumojn pri la vivo, verko, leteroj, artikoloj de Zamenhof. Ni salutu tiun gigantan laboregon.

Alia giganta verkaĵo:"Poemo de Utnoa", originala epopeo en ĉirkaŭ 7 000 versoj, de Abel Montagut. Sendube grava etapo en la historio de la literaturo en esperanto.

"Noveloj el la Norda Montaro" kaj "Memori kaj forgesi" de la aŭstraliano Trevor Steele.

Se vi instruas esperanton, havigu al vi la 16-paĝan broŝureton de Catherine Samain:" Instrui esperanton por komuniki - Skizo pri la komunik-situacia instrumetodo".

Por la esperantaj bibliotekoj, jen la verkoj de alia nuntempa aŭtoro, S. Stimec:"Kroata milita noktlibro","Geografio de miaj memoroj"

KURIOZAĴOJ PRI DU FILOZOFOJ

La 10-an de novembro 1619, en Saksujo-Vurtembergo, ĉe danuba riverbordo. frostporta pluvo batas la doman tegmenton, dum hurlanta vento blovadas. 23-jara junulo trankvile sidas sub plurkandela lumo kaj estas leganta verkon pri muziko. Li alproksimigis siajn tablon kaj fotelon al zumanta fajenco-stovo kaj sin sentas bone. Li estas soldato en la armeo de duko de Bavarujo kaj ĝuas mildan vivon en tiu vintraĉo, post kiu li estas batalonta kontraŭ la trupoj de la palatinata elektisto Frederiko la 5-a. Ĉar li eksentas emon dormi li enlitiĝas kaj spite la tempeston rapide endormiĝas. Stranga sonĝo lin vizitas. Li estas marŝanta sur nekonata strato, kiam fantomoj aperas antaŭ lin. Pro timo li provas fuĝi sed sentas grandan malfortiĝon je la dekstra korpoflanko. Por antaŭeniri li estas devigata mal-dekstren fleksiĝi. Ĉar groteskas tia irmaniero li tutforte strebas al rektiĝo sed impeta ventego malhelpas kaj lin devigas tri-kvar -fojojn turniĝi kvazaŭ turbo, sur la maldekstra piedo. Kiam la turniĝa movo ĉesas li provas iradi plu, sed peniga montriĝas lia paŝado pro la korpa pozicio kaj ĉe ĉiu paŝo ŝajnas al li, ke li estas falonta. Jen survoje videblas kolegio kun malfermita pordo. Li eniras por sin ŝirmi. Li sin direktas al la kolegia kapelo por tie preĝi, sed rimarkas, ke li preterpasis konaton, ne salutinte. Li volas retropaŝi sed estas mal-helpata de la impeta vento. En la sama momento, en la kolegia korto, li vidas alian homon, kiu lin vokas laŭnome, dirante:"Ĉu vi ne volas esti tiel afabla kaj porti ion al niaj amikoj?" - "Ion ? Sed kion?" Nenia respondo. Sed la soldato opinias, ke temas pri melono el eksterlando veninta. Li volas paŝi plu, sed li malrapidas, ĉiam fleksiĝanta kaj ŝanceliĝanta, dum la preterpasantoj firme staras sur siaj kruroj, ĉar la ventoblovado kvietiĝis. Pro sento de malfeliĉo li vekiĝas kaj malfacile eltiriĝas el tia angorporta sonĝo. Li kredas je malica feo, kiu celis lin turmenti kaj sin turnas al Dio per longa preĝo, por peti, ke la ĵus travivita vizio ne malbonefiku. Du horojn li mueladas malĝojigajn pensojn. Li reendormiĝas kaj falas en duan sonĝon. Li aŭdas laŭtan ekkrakan bruon, kiu lin pensigas pri tondrobato. Timosento lin vekas kaj li ekvidas fajrerojn dismetitajn tra la ĉambro.. Sed li ne maltrankviliĝas, ĉar jam plurajn fojojn tiel okazis. Post momento li reendormiĝas, falonte en trian sonĝon.

Antaŭ li sur tablo libro kuŝas. Li ĝin malfermas kaj rimarkas, ke tio estas vortaro. Duan libron li ekvidas: ĝi estas antologio pri diversaj aŭtoroj. Li ĝin trafoli-umas kaj tuj trafas la jenan latinan verson:"quo vitae sectabor iter", (kiun vivovojon mi elektos)? Sammomente nekonato ekaperas kaj etendas al li poemon komenciĝantan per la jenaj latinaj vortoj,"est et non" (kio estas kaj kio ne estas). Kaj li diras:"Ĝi estas bonega verko".- Mi ja scias", la juna soldato rebatas. Cetere ĝi kuŝas en tiu ĉi poemkolekto" Sed kvankam li zorge trafoliumas la libron, li ne sukcesas trafi la poemon. Li enmanigas la vortaron kaj rimarkas, ke mankas paĝoj. Li iom interparolas kun la nekonato; poste ambaŭ homo kaj libro foriĝas. Tuj kiam li vekiĝas, li sentas sin tiom konsternita, ke li volas tuj trovi la ĝustan ŝlosilon por la interpretado de tiuj sonĝoj, kiuj liaopinie estas al li senditaj de la Ĉielo. La latina verso klare indikas, ke li staras antaŭ viv-kruciĝo; la poemo signifas, ke li devas dispartigi veron disde malvero en la amaso de la homokonoj, kiujn la vortaro simbolas. Ĉio tiel klaras por li, ke li persvadas sin pri tio, ke la Spirito de la Vero malfermis antaŭ li la trezorojn de ĉiuj sciencoj pere de tiuj sonĝoj. La ventego estas malica feo: tial Dio ne permesis, ke eĉ al sankta

loko li estu pelata. La melono simbolas la ĉarmon de soleco. La fulmobato estas la Spirito de la Vero en lin desuprinta, lin eksposedonta.

Certe vi jam delonge divenis, ke nia soldato estas René Descartes, Kartezio. Tiel decidigaj fariĝis la tri sonĝoj, ke de la posta tago, li sin direktis al la asignita vojo, ĉion laŭmetode studante. Liaj tutaj vivo, verkaro kaj filozofio baziĝas ŝur la interpretado de tri sonĝoj. Ilian signifon li klarigis en sia verko "La olimpaĵoj", publikigita nur en 1791. Li tiom firme kredis, ke la tri sonĝoj estas iu signo de Dio, ke li pligrimis al Italujo por plenumi tiuokaze faritan promeson.

En 1928 verkisto petis Freŭdon, ke li donu sian propran interpretadon pri la sonĝo-enhavo. Liaj konkludoj parte kongruas kun tiuj de la sonĝinto. La malfacilaĵoj en paŝado signas enan konflikton; la maldekstra flanko prezentas la malbonon, la pekon; melono simbolas seksan subpremadon (se li tiam havintus amatinon, li ne estus sonĝinta pri melono).

De post la sonĝoj Descartes akceptis, kiel veraĵon, nur tion, pri kio li sciis, ke ĝi estas tia. Amuza paradokso, ĉu ne? Ĉe tipa raciemulo! Ĉu li interesiĝis pri okultaj sciencoj? Ŝajnas ke ne. Tamen, dum li estis en Germanujo, li klopodis estis akceptata ĉe la rozkrucanoj, sed oni dubas ĉu li estis inicito. Li ankaŭ kliniĝis super la telepatiaj fenomenoj.

Sed kion signifas la titolo "La olimpaĵoj"? Ĉar li kredis, ke li estas ricevinta signon el la ĉielo; cetere ĉar li opiniis, ke en la homestaĵo kuŝas ankoraŭ neuzataj eblecoj, dank'al kiuj ĝi povus egali la olimpajn diaĵojn.

*

* *

Dum la jaro 1624 en la arvernia urbo Clermont-Ferrand. Etienne Pascal estas unu el la tieaj gravuloj. En lia burĝa domo kunvivas la edzino kaj tri infanoj: du filinoj kaj la eta Blaise unujaraĝa. La tre pia patrino malavare disdonadas almozojn. Unu el ŝiaj zorgatinoj estas laŭdira sorĉistino: sed je tio S-ino Pascal ne kredas kaj ŝi daŭre akceptas la mizerulinon. Dume malbonfartas la bebo, kiu miskreskas kaj en du apartaj okazoj elmontras strangajn reagojn: unue li ne povas elteni la vidon de akvo, ĉu en glaso, ĉu en ujo alispeca. Li tuj falas en terurajn konvulsiojn. Due, li ne povas toleri, ke la gepatroj staru kune ĉe li. Pri ilia ĉeesto li konsentas nur kondiĉe, ke ili ne estu unu apud la alia. Tuj kiam ili kunestas, li malkvietiĝas apenaŭ spiras, sufokiĝas. Ĉu li atingos la dujaran aĝon? Li senĉese malfortiĝas; oni timas baldaŭan morton.

Multaj pretendas, ke lin prisorĉis la sorĉistino. La patro volas ĉesigi tiun stultan onidiron kaj venigas la virinon, kiu sin pravigas. Etienne Pascal avertas ŝin, ke se ŝi estas la infanon prisorĉinta, li pendumigos ŝin. Jen ŝi falas je liaj genuoj. Jes, ŝi konfesas, ke tion ŝi faris, ĉar Etienne Pascal rifuzis zorgi pri ŝia proceso. Do ŝi venĝis sin. Nun ŝi tre bedaŭras, ke la gepatroj tiel tenere amas sian idon, ĉar li estas mortonta. Tamen, se la patro ne denuncos ŝin, la sorĉaĵon ŝi direktos al aliulo kaj la bebo estos savita. Sed la kuraĝa patro rebatas:" Mortu mia filo prefere al aliulo."

Tamen la virino scipovas direkti la sorĉaĵon al besto. Li proponas unu el siaj ĉevaloj, sed ŝi diras, ke kato sufiĉos. Sekve ŝi ricevas katon. Oni miras ĉe la penso, ke tiu homo estas klerulo: fama fizikisto kaj matematikisto, kiu korespondadas kun la tuta eŭropa sciencularo. Richelieu alte estimas lin.

La sorĉistino foriras kun la kato. Sed sur la ŝtuparo ŝi krucpasas du kapucenojn, kiuj venas por konsoli la kompatindan patrinon. Ili konas la virinaĉon. Unu el ili metas la manon sur la katon dirante:" Ian sorĉaĵon vi estas ankoraŭ faraĉonta." Tiam ŝi tiel impete forĵetas la beston trans la fenestron, ke ĝi frakasiĝas

sur la kortaj pavimoj. Ŝi petas duan katon de la patro, kiu tuj plenumas la peton, ĉar tre versâjne kato de monaĥa mano tuŝita ne plu taŭgas por magiaĵo. Kaj denove la klerulo ne dubas...

Dum la vespero la sorĉistino revenas. Ŝi bezonas infanon malpli ol sepjaraĝan, ĉar senkulpa maneto devos kolekti, antaŭ la sunleviĝo, sep foliojn el difinitaj plantoj. Tion faros la filino de apotekisto laŭ peto de Etienne Pascal. Je la sepa matene la sorĉistino alportas kataplasmon lokendan sur la ventro de la bebo. La patro komisias la mamnutristinon tion fari. Sed kiam li rehejmeniĝas je tagmezo, la tuta familio montras larmoplenajn okulojn, ĉar en sia lulilo la infano estas mortinta. La konsternita patro impetas eksteren; sur la sojlo li enbatiĝas en la sorĉistinon, kiun li vigle survangas. Ŝi ruliĝas teren. "Ne koleru," ŝi petegas. "Mi forgesis averti vin: ĝis noktomezo la infano ŝajnos mortinta. Sed je noktomezo li releviĝos."

Dume la infano ne plu spiras, lia korpo malvarmiĝas; oni ne plu perceptas pulsbatadon. Solas en la ĉambro la maldormantaj gepatroj. Inter noktomezo ĝis la unua matene, jen la infano ekoscedas. Oni lin revarmigas, trinkigas sukeritan vinon. Li mamsuĉas, sed ŝajnas senkonscia kun daŭre malfermitaj palpebroj. Finfine, je la sesa, li malfermas la okulojn. Ĉe fido de la superlite kliniĝantaj gepatroj li estas trafita de teruraj konvulsioj, kiel antaŭe. Do li ja ne estas resanigita! Tamen post kelkaj tagoj li ludas per glaso da akvo en la patrinaj brakoj. Post du semajnoj li ridetas al la unu apud alia starantaj gepatroj. Post tri semajnoj li reakiras fortojn; li estas savita. Ĉu plene resanigita? Eble ne tute. Li mortos 39-jaraĝa pro malsano, kiun la nuntempaj kuracistoj ankoraŭ pridiskutas. Dum la tuta vivo li plendos pri strangaj malsanetoj.

Kion entenis la kataplasmo? Supozeble miksaĵon el kata hepataĵo kaj la kolektitaj plantoj. La tuto celis estigi specon de katalepsio postsekvota de resorbiĝo de la strangaj alergioj. Malfacile imagebla estas la konversacio inter la apotekisto kaj la fama jurfakulo, tiu, kiu flegis rilatojn kun Robertval kaj Fermat, kiuj korespondadis kun pastro Mersenne, la tiel-nomata "leterkesto de Eŭropo"...

Sian klerecon pri sciencoj kaj beletro Blaise ŝuldos al tia patro. "El tiu familio ion grandan ni faros", Richelieu ekkrias, kiam li akceptas la patron, filon kaj du filinoj Jacqueline kaj Gilberte laŭnome. Ĉiuj el ili ĝuas brilegan menson.

Tiu afero pri envulto multon sciigas al ni pri la tiama pensmaniero. Duobla ĝi aperas: sub samtempa influo de la ĵus vortigitaj karteziaj teorioj kaj de persistaj kredoj pri magio kaj ties praktikado. Ĉu sub Ludoviko la XVI-a la tuta kortego ne estos skuata de gigantskala proceso pri nigra magio, kiun la reĝo mem ĉesigos pro troa skandalo? Komence de la XVII-a jarcento Arvernio estas privilegia grundo por sorĉistinoj.

Sur kiu dokumento la historiistoj baziĝas koncerne la Pascal-aferon? En 1646 la fratino Jacqueline retiriĝas ĉe la soluloj en Port-Royal abatejo. Ŝin post nelonge reatingas ŝia nevino Marguerite Perier. Ĉi lasta mirakle resaniĝas de larmodukta ulcero post ektuŝo de dorno el la dornkrono de Kristo. Tiel impresata estas la onklo, ke li forlasas matematikon, sin dediĉonte al sia verko "Apologio de la kristana religio"; el ĝi estas eltirataj la "Pensoj". En Port-Royal Marguerite verkas sian "Memuaro(n) pri la vivo de S-ro Pascal". En ĝi legeblas la rakonto de neniu historiisto kontestata:" Kiam mia onklo estis unujara, okazis kun li io eksterordinara." Tial ke magia aventuro kongruas, nek kun la matematikisto, nek kun la kristano, oni kutimas ĝin prisilenti. Sed kiu povas aserti, ke morto kaj posta releviĝo ne supervigligis la cerbon de tiu hiperdotito? Oni opinias, ke li mortis pro stomaka kancero kun metastazoj ĉe intestoj kaj meningoj.

KVIZO

PRO LITERATURA

GEOGRAFIO

Jen kvin priskriboj de naturaj ĉirkaùaĵoj, kiujn esperantistaj aùtoroj aù vidis aù imagis. Du lokoj estas en Eùropo; inter la ceteraj po unu estas en Afriko, Sudameriko kaj Oceanio. Ĉu vi, kiel bona esploristo povas identigi la geografiajn regionojn, doni la titolojn de la libroj kaj nomi la aùtorojn? Inter tiuj ĉi troviĝas aùstraliano, finnino, franco, jugoslaviano kaj ruso.

1- "...Matene netaj kaj bluaj estas la ombroj, sed grade laù la supreniro de la suno, ili malaperas kaj la konturoj de la dunoj stompiĝas. La ondoliniaj pintmontoj kaose svarmas kun rebriloj flavaj, rozaj, ruĝaj. Poste la krestoj glimlumas kun rava ortono kaj eligas kvazaù blondan fumon. Estas la vento, kiu, senĉesa laboranto, skrapetas la plejaltaĵojn kaj forbalaas la subtilan sablopolvon. Vespere, kiam subiras la suno, venas la "malva horo", la mire bela horo. Antaù ol ili estos sorbitaj de la nokto, la silentaj kaj senvivaj dunoj sin ornamas per tiel milda nuanco, ke ili mienas ne plu timigaj. Ili ŝajnas sin interfrapi, kiel furiozaj ondegoj, nun ili kvietiĝas, lutiĝas al senforma kaj rigida maso, kiu transruĝiĝas, nigriĝas kaj foriĝas..."

2- "...La printempo venas per forto kaj viglo, la suno alproksimiĝas ĉiun tagon pli varma kaj pli kaj pli heligas la noktojn. Per nekredebla rapideco degelas la neĝamasegoj sur la sudaj montdeklivoj kaj la riveretoj transbordiĝas. La printempaj akvoj kantas kaj murmuras ĉiuflanke, ĵetante sin gaje supren laùlonge de la deklivoj. La migrantaj birdoj - de la majesta kantcigno ĝis la plej eta regolo- revenas en sian nordan hejmlandon. Iliaj jubilaj sunkantatoj aùdiĝas ĉie, sur deklivoj, ĉe lagobordoj, en arbaroj. La tuta naturo jubilas kaj triumfas pro tio, ke la suno kaj lumo venkis... La betuloj ekricevas en malmultaj tagoj novan bonodoran dolĉeverdan foliaron...la zumado de la milionoj da malsataj kuloj, ree sonas en la arbaroj, tiel ke boacaroj fuĝas pro tiuj sangosoifaj bestetoj en la montpintan venton..."

3- "Forlasinte la kakaoplantejon, ni eniris la ĝangalon laù herbe tapiŝita vojo, pli konvene priskribita kiel tunelo pro tio, ke la ĝangalo formis arkaĵon super preskaù ĝia tuta longo. La trapaso de la veturilo sur la herbaĵo ŝajnis strange kvieta kaj facila, simila al la moviĝo de glitveturilo sur neĝo.

Ĉi tiu rava vojo serpentumis la ĝangalon per neniam ĉesantaj turniĝoj; en multaj lokoj la kreskaĵoj samtempe brosis ambaù flankojn de la veturilo. La plej granda parto de la vojo kuŝis sub la ombro, sed jen kaj jen radio de sunlumo penetris la supran verdan baldakenon, hele lumigante parton de la suba verda tapiŝo.

Fine la ĝangala vojo subite plilarĝiĝis, tiel vaste fendante la altan baldakenon, ke la sunlumo trafluis, inundante la nun senherban teron kaj ĉiuflanke aperantajn indiĝenajn loĝejojn."

4- "Hieraù nokte furiozis la ŝtormo. De post Stettin, tuj post kiam ĝi postlasis la labirinton de l'fajroj, la ŝtala belulo trafis potencan ĉirkaùprenon de la ŝtormo. La kolerega ciklono kaptis ĝian bruston per la larĝa mantelo, kun sovaĝa ĝemego kontraùbatante sur pintojn de la mastoj kaj tamburante sur la ferdekojn grandajn gutojn de la pluvo. La furioziĝinta maro estis ĵetanta pezajn tavolojn de l'akvo en hermetike ŝlositajn vitrojn de l'iluminiloj, superverŝante ilin per rapide ruliĝantaj larmoj. Kuntirinte la fortojn kaj sin streĉinte, ĝi suprenĵetis la malvarmajn kaj glitajn brakojn ĝis la rando de l'ŝipbordo. Ĝi alkroĉiĝis al la balustrado kaj kun tondrego faladis, disfluis sur la ferdekoj, ĉirkaùlavante vandetojn de l'knabinoj."

5- "La sekvinta tago komenciĝis

trankvile kaj kun belega suno, kiu blindige briligis la blankan surfacon de la neĝkovrita kampo nin ĉirkaùanta. La nigraj okulŝirmiloj estis ne sufiĉaj, ĉar malgraù ili, ni devis marŝadi kun la okuloj preskaù fermitaj... La lasta parto estas sufiĉe kruta deklivo, semita per rokoj, kiujn oni devas surgrimpi uzante la forton de la manoj... Generale tiu deklivo havas restaĵojn de neĝo, kaj foje tute malhavas ĝin... ni havis la malbonŝancon trovi ĝin tute kovrita per neĝo, kies dikeco kelkloke atingis du metrojn, kaj el kiu izole elstaris la plej grandaj rokoj. La neĝo, sub la efiko de la tagmeza suno estis mola, kaj foje ni eniĝadis en ĝin ĝiskole; subite ni staris je la bazo de roko, kiu ĝis tiam estis nevidebla pro la neĝo, kiu ĝin kovradis, kaj kiun oni devas suprengrimpi."

Respondoj-

1- Jean Ribillard, kiu servis, kiel oficiro de la franca armeo en Nordafriko, priskribas la dezertan pejzaĝon de la Okcidenta Saharo en sia kolekto de vojaĝ-skizoj "Vagado sub Palmoj" eldonita en 1956 kaj denove en 1977.

2- La arkta naturo kaj la homoj kaj bestoj de Laponujo estas pentritaj per trafaj vortbildoj en "Kie Boacoj Vagadas" (1967) de la finna verkistino Eija Salovaara.

3- La aùstraliano Kenneth G. Linton rakontas siajn travivaĵojn en la ĝangaloj kaj lagunoj de Nov-Gvineo dum la dua mondmilito en "Kanako en Kananam" (1960).

4- En la romano "Metropoliteno" (1933 kaj 1977) de Vladimir Varankin, Vitalij, la ĉefrolanto, vojaĝas de Stettin al Leningrado sur la germana vaporŝipo "Preussen", kiu estas trafita de nokta ŝtormo en la Balta Maro.

5- En "Tempesto sur Akonkagvo" (1959), oni povas legi, kiel Tibor Sekelj sukcesis venki la profundan neĝon kaj la altajn rokojn de Akonkagvo, la plej alta monto en Sudameriko, por atingi la pinton.

OFTE DUM LUMECAJ NOKTOJ HELAJ

de Hannes Hafstein

Ofte dum lumecaj noktoj helaj
elanimas kanto de poet'.
Super valo ŝvebas revoj belaj,
regas pac' el fontoj altĉielaj.
Ondoj spiras borde en diskret'.


Ho, mi sentas kiel koraj mildoj
fluas en la maron de spirit'.
Ne forpelas ilin baraj ŝildoj,
super maro vagas ombraj bildoj.
Tie kaŝas sin la infinit'.

Sed mi scias, koro de kuraĝo,
ke batali vi ja ŝatus pli,
ke poemojn viajn de mesaĝo
vi preferus montri, sen miraĝo,
gajni venkon brile en graci'.

Sed okazas paùzoj en bataloj,
mar' ripozas fine en kviet'.
La kolera sento pri fataloj
forgesiĝas, cedas la realoj
de sufer' kaj morto, laù dekret'.

Kaj dum tiuj spertoj sen similo
mi la mondon sentas sen problem',
sidas ĉe la pordo en trankvilo,
ĝuas noktajn kisojn en humilo
kaj elspire flugas la poem'.

trad. BR



Memoru, ke la nova abontarifo estas, ekde la komenco de 1994, 80,oo fr. Niaj eksterlandaj abonantoj bonvolu konsulti nian rubrikon: "Nia Perantoj" sur la lasta paĝo de la kovrilo.

LA DERVIŜO RAKONTAS

La plej mallaborema viro en la tuta mondo- Iam, iu ŝaho de Persio, estis kolektinta en sia palaco la plej belajn mirindaĵojn de la mondo. La palaco estis vere arkitektura juvelo: en la parko staris tiom da belegaj konstruaĵetoj, kiom da edzinoj en la kortego, t.e. pli ol cent. Ĉiuvespere okazis festoj kaj festenoj; la ĝardenoj estis iluminitaj. La orientaj festoj estas ĝenerale belegaj; sed tiuj de la persa reĝo estis la plej belaj. La kunmanĝantoj ridis, kantis laŭdojn..., dum centoj da servistoj metis antaŭ ilin botelojn da vinoj, ŝafojn kuiritajn sur stangoj, anserojn banantajn en orumaj saŭcoj kaj multajn aliajn viandaĵojn. Dum la manĝoj odaliskoj, vestitaj nur de travideblaj ŝtofoj, dancis kaj tio daŭris ĝis la sunleviĝo.

La landlimoj estis kvietaj; la ministroj zorge kaj honeste regis; la vivo de la ŝaho estis plej agrabla. Sed la ŝaho ne estis feliĉa. Li opiniis, ke mankas unu juvelo en lia kolekto: la plej mallaborema viro en la mondo. Li petis sian ĉefministron plenumi lian deziron. "Mi scias, ke ne mankas la mallaboremuloj en mia kortego sed mi estas certa, ke la plej mallaborema viro ne ĉeestas tie ĉi. Tre rapide trovu lin. Ne gravas la elspezoj."

La ĉefministro diskonigis en la tuta lando la informon, ke la ŝaho disponigas belegan palacon al la plej mallaborema regato kaj ankaŭ porvivadon. La postan tagon jam arego da viroj kuris al la palaco, dum aliaj, pli mallaboremaj, skribigis al la ministro, ke ili estas pretaj akcepti la proponon, kondiĉe ke oni venu preni ilin. El tiom da homoj la ĉefministro ne sciis kiamaniere trovi la "rarajon".

Post du monatoj la ĉefministro konstatis, ke ĉiuj kandidatoj estas samrange mallaboremaj. Neniu vere superis la aliajn. Li komencis timi pri sia kapo ĉar la ŝaho malpacienciĝis. Fine lin trafis ideo. Ĉar la mallaboremuloj pasigis almenaŭ tri kvaronojn el la tempo en la banejo, babilante kaj ripozante, la ministro ordonis al la banestro plivarmigi la akvon de la baseno kaj ankaŭ la ĉambron mem. Laŭ la plialtiĝo de la temperaturo, la banantoj, ĝenataj, foriris unu post la alia, kvankam tio postulis de ili ne-atenditan energi-elspezon. Kiam la akvo komencis boli restis nur du viroj. La aero fariĝis nespirebla; unu el la viroj, timanta pri sia vivo, ekkriis, sed neniu venis al li. Post momento lia kunestanto flustris en lian orelon: "Amiko, ĉar vi kripetas helpon, bonvolu diri al tiuj servistaĉoj, ke ankaŭ min ili devas helpi".

La ĉefministro, kiu aŭskultis malantaŭ la muro, miris pro tiuj paroloj. Li liberigis la du virojn kaj la postan tagon prezentis al la ŝaho la plej mallaboreman viron en la mondo.

La stultulinoj- Antaŭ tre longe, en domaĉo de malriĉa vilaĝo, vivis Hasan kun siaj edzino kaj filino. Hasan estis arbohakisto kaj ofte iris for en la arbaron; la du virinoj gardis la domon kaj paŝtis la tri maldikajn ŝafojn, kiuj konsistigis la nuran riĉaĵon de la familio. Ili pli malpli bone plenumis siajn taskojn, kvankam ili estis konataj en la tuta vilaĝo, kiel stultulinoj. Sed ĉio iris glate ĉar ili ĉiam faris la samajn gestojn kaj inteligenteco ne necesis.

Iam la edzino de Hasan, kiu estis graveda, petis sian edzon fari bebo-liton. La edzo tuj eklaboris esperante, ke la Sinjoro alportos al li filon. Kiam speco de kesto estis finfarita, li muntis ĝin sur du kurbaj branĉoj por fari lulilon. Poste li ordigis siajn ilojn, metis la liteton en angulon de la ĉambro sub la dikega hakilo, kiun li uzis por faligi la plej dikajn arbojn kaj pendigis hejme de la plafono.

Forirante, la postan matenon, Hasan diris:" Ĝis revido, virinoj. Alaho benu vin kaj tiun domon. Li donu al mi filon kaj je mia reveno mi dankos lin pro tiel granda feliĉo!" Li kisis la virinojn kaj foriris. La du virinoj revenis en la domon kaj rigardis la faritaĵon de Hasan. Sed la filino ekkriis:" Patrino, la infano, kiun vi portas en via ventro, estas endanĝerigita ek de sia naskiĝo. Rigardu!" kaj ŝi montris la hakilon, kiu pendis super la liteto. La patrino eksploris dum la filino kriis antaŭvidante la frakasitan kapon de la bebo. Tiel bruaj estis ilia lamentado, ke najbaro venis kaj demandis pri la kaŭzo de tiel granda ĉagreno. Kiam la virinoj klarigis la aferon li ekridis kaj diris, ke sufiĉas meti la liteton aliloken. Tion ili faris dankante la konsildonanton. Post unu horo la tuta vilaĝo ridis pri tiu afero kaj la primokitaj virinoj denove ploris.

Religiulo preterpasis la domon kaj informiĝis pri la kaŭzo de la ploroj. La patrino klarigis la aferon de la hakilo kaj de la liteto, sed forgesis paroli pri la konsilo jam donita de la najbaro. La religiulo nur diris, retenante ridojn :" Ne ploru; nur metu la hakilon aliloken", kaj li daŭrigis sian vojaĝon.

Pensante, ke du konsiloj superas unu nuran, la virinoj, kune strebante, deprenis la hakilon de la plafono kaj pendigis ĝin ĉe alia najlo. Ili konstatis, ke denove la hakilo pendas super la liteto. Sed, ĉi foje, ili ne ploris. Ili komprenis, ke Alaho ne deziras la vivon de la filo de Hasan!

La muro- La fiera viro ĉiam plaĉas al Alaho, ĉar li estas brava; la orgojla viro ofendas lin, kvankam lia aŭdacemo kelkfoje ĉarmas lin. Sed li tiom malŝategas malmodestecon, ke li ĉiam degnas ridindigi kaj groteskigi la homojn malmodestajn.

La religiulo Nasr ed Din estis fama en Tuta Oriento pro sia mokemo kaj spriteco. Tre ofte venis de malproksime homoj por aŭskulti lin malhonori la malvirtojn de sia epoko, moki la stultulojn kaj pervorte puni la malbonulojn.

Iu malmodestulo, kiu loĝis en tre malproksima parto de la Imperio decidis fronti multekostan veturon por renkonti la religiulon.

Alveninte en la urbo, la fremdulo vagis dum horoj kaj fine trovis Nasr ed Din sidantan kun dorso ĉe la muro de la moskeo, kie li kutime alparolis siajn fidelulojn. Starante antaŭ la religiulo la vojaĝinto lin salutis riverence, kiel decas al sanktaj homoj, kaj iom arogante diris:" Ĉu vi vere estas Nasr ed Din?"- "Jes", respondis la religiulo. "Mi multe aŭdis pri vi", pludiris la fremdulo, impertinente, "kaj mi ŝatus scii, ĉu via reputacio ne estas tro alte taksata; ĉar oni atribuas al vi grandajn farojn, kiuj estus indaj je miaj". Nasr ed Din komprenis, kiuspeca viro staris antaŭ li. Li respondis humile: "Oni multe parolas pri mi, via moŝto, sed oni troigas ĉar tiel kompatinda viro, kiel mi, ne posedas la spiritajn kapablojn necesajn por fari, kion oni atribuas al mi". "Facile estas taksi viajn meritojn, sinjoro religiulo. Vi certe rifuzos iamaniere trompi min".- "Mi konsentas", diris Nasr ed Din," sed ne estos facile kun vi".- "Kial?" - "Ĉar mi vidas, ke vi ne estas facile trompebla viro, kaj mi ne povos agi laŭ miaj kutimaj ŝercoj" - "Kaj?"- "Ĉar mi ne povos provi trompi vin se mi ne havás mian sprit-sakon".- "Kie estas tiu sako?" -"Hejme" - "Do, iru por preni ĝin."- "Konsentite. Sed vi povas vidi, ke, tie, mi provas malhelpi la disfalon de tiu muro. Se iu konsentos sidi en mia loko kelkajn mikutojn, mi povos iri"- "Bone mi tenos ĝin, kvankam mi ne kutimas je tiuj malindaj laboroj". Li apogsidis ĉe la muro, dum Nasr ed Din ekiris, ridetante en sia barbo.


POR VIA DISTRO

SOLVO DE LA ANTAŬA ENIGMO

Trovotaj vortoj: lakto - krimo - kruro - mardo - brako - libro - triki - steto - melki - griza - marto - frako - vosto - krono - kofro - petro - kreto - linko - kruta - cedro - bleki - marko - sveni - havro - trefo - hundo - flava - pasko.

La proverbo estas:
Kiu rabi eliras, ofte nude revenas.

NOVA PROBLEMO



Horizontale: 1)- Senigi iun je fidindeco - 2)- Ĝuanta ekvilibran karakteron; inverse, nombro - 3)- Unuafoje faritaj; forigi haladzon - 4)- Senekstera instigi (r.); Ekceso - 5)- Vokaloj; flavmalsano - 6)- Ideografiaja - 7)- Fantazie elpensita ÷ ofendintence pika (r.) - 8)- Nedifinita pronomo; prepozicio; klaĉo (r.) - 9)- Sukulenta planto kun longaj dikaj sukoplenaj bazaj folioj kaj tuboformaj floroj (r.); sen eĉ vinfolio (r.); interjekcio por alvoki telefon-korespondanton - 10)- Estas pli bone havi du ŝnurojn ĉe la sia; participa adverba finaĵo ÷ tia estas urtiko (r.) - 11)- Ĝi strečas ŝtrumpon (r.); ludona - 12)- Tia estas olivo; por kunigi du metaltavolojn.

Vertikale: 1)- Ĉio kion oni proponas por kvietigi la soifon de gasto - 2)- Tre ĝena trudherbo ĉe domo; vadbirdo (r.) - 3)- Parto de preĝejo; prefikso; malnova unuo de termezurado (r.) - 4)- En Skotlando, grupo de familioj (r.); amerika mamulo el la subordo de rabobestoj - 5)- Permesilo; inversita prepozicio - 6)- Prepozicio; bona trančilo devas esti tia; el oro ĝi taŭgas por ĉiu laboro - 7)- Rilata al plurjaraj plantoj; participa finaĵo - 8)- Inverse inklini; nomo de belbrusta filmheroino - 9)- Ĝi devenas de la feĉo kiu formiĝas en vino (r.) - 10)- Formortinta bovo; inversita prepozicio; ĉiam verda arbo (r.) - 11)- Sur la dorsa flanko de poŝtmarko; froti ŝuojn per ciro - 12)- Imbecilo (r.); Desegno teksita sur ŝtofo (r.).

LA VIVO EN GRESILLON

Ĝenerala Kunveno - la 7-an de majo 1994

La kunveno komenciĝas je la 15.30 h. Prezidas Fernand Boyet. La nombro da ĉeestantaj kaj reprezentataj membroj estas 283. Ĝi superas la postulatan kvorumon. D. Babin anoncas, ke la nova kapitalo atingas 210 300 frankojn post repago de kelkaj akcioj (3 100 fr.), kaj akiro de novaj akcioj (1 100 fr.). La nombro da asocianoj atingas nun 931 post malapero de 7 kaj veno de 2 novaj.

D. Babin donas kelkajn detalojn pri la aktivado de la Esperanto-Domo en 1993. Dum la printempa periodo 64 infanoj el 3 nacioj partoprenis. La intelektaj kaj manaktivaĵoj estis diversaj kaj multnombraj. La akcepto de eksterlandaj geknaboj estis ebla dank'al la malavara financa helpo de pluraj amikoj. Estas decidite peti la komitaton daŭrigi la alvokojn favore al la Fonduso Infan-Renkonto.

La someraj staĝoj multe plaĉis al la ĉeestantoj malgraŭ ilia iom malpli granda nombro. La tradukkursoj akceptis neampleksan sed laboreman grupon da partoprenantoj.

Por la kurso-ĉambroj kelkaj tabloj estis akiritaj. Magnetofono estis aĉetita por la kursgvidantoj, kaj ankaŭ komputilo por la kalkulado, kaj printila komputilo por la sliparoj kaj adresado. La renovigado de la ĉambro, kie la tolaĵoj estis lavataj estos finita fine de la monato majo.La tegmento de la granda salono, kiu estis grave difektita, estas nun riparita.

La financa raporto montras malkreskon de la enspezoj, proksimume naŭ procentojn. Responde al demandoj pri la prizorgado de la arbaro kaj de la parko, D. Babin precizigas ke daŭre prizorgas la parkon la asocio C.A.T. kaj, koncerne la florojn, paro de ĝardenistoj. Iu najbaro purigas la arbaron.

La rezulto de la baloto pri renovigo de duono de la komitato estas tiam anoncita: voĉdonis 287 membroj; 50 balotiloj estis nuligitaj ĉefe ĉar la voĉdonantoj lasis la 7 nomojn de la kandidatoj. Estis elektitaj: D. Babin, H. Boyet, B. Cheverry, G. Lagrange, P. Naulet, M. Noulin.

La prezidanto fermas la kunsidon je la 17.30 h.

La sekretario: Guy Dairon

Komitat-kunveno - Dimanĉon 8-05-94

La prezidanto,D. Babin, bonvenigas la novelektitan komitatanon Marc Noulin. La nova estraro konsistos el:prezidanto: D. Babin; vic-prezidantino: P. Naulet; sekretario: G. Dairon; help-sekretario:H.Boyet; kasistino: D. Gourdon; help-kasistino: J. Vincent.

La printempa staĝo estis sukcesa ne nur dank'al la ĉeesto de pli ol 60 infanoj el kiuj 13 estis eksterlandanoj (Pollando, Sta Petersburgo, Hispanio), sed ankaŭ de 23 adoltoj. La francaj infanoj venis el la norda parto de la lando, el urbeto apud Baugé, el Bordeaux, Nantes, Bourges. Venontan jaron estos necese organizi kurson por komencantoj kaj doni la eblecon trapasi la Ateston pri Lernado. Por la staĝoj 1994 nur malmulte da aliĝiloj alvenis ĝis la fino de aprilo. Sed tiu malfruo estas pli kaj pli kutima. La antaŭvidita programo estas konfirmata kun la jenaj instruistoj: M.J. Berger, J. Vincent, Pszemek Grzibowski, Tatjana Loskutova, D. Moirand, Eva Bondar, Frenand Boyet, Georges Lagrange, Dennis Keefe. M.T. Lloancy kaj J. Thierry prelegos pri la vivo kaj verkaro de R. Schwartz. Dorotea instruos ŝakludon kaj Kimie la uzadon de bulkalkulilo. Prizorgos la administradon de la staĝoj: L. kaj P. Babin, N. kaj D. Babin, J. kaj D. Moirand, R. Lenel kaj Ph. Combot, D. kaj M. Noulin.

La kongreso de SAT-Amikaro okazis en la kastelo dum la paska libertempo. 170 kongresanoj partoprenis. La plej multo loĝis en la kastelo, kelkaj kampadis aliaj tranoktis en ne malproksima hotelo. Ĉiuj havis siajn manĝojn en la kastelo, laŭ du servo-tempoj.

Staĝoj 1995- La printempa renkonto de la infanoj okazos de la 15-ĝis la 23-a de aprilo. Povos esti akceptitaj unu aŭ du grupoj de alilandaj infanoj, laŭ la amplekso de la donacoj (ses aŭ dudek infanoj).

La somera periodo komenciĝos la 22-an de junio kaj finiĝos la 31-de aŭgusto. 22/06 ĝis 07/07: kursoj kaj manaktivaĵoj - 08/ ĝis 22/07: kursoj trinivelaj - 23/07 ĝis 05/08 kursoj trinivelaj kaj kurso pri gramatiko (1-a semajno) kaj kurso pri tradukado (2-a semajno) - 06/08 ĝis 19/08 kursoj trinivelaj - 19/08 ĝis 31/08 kursoj trinivelaj. Du temoj estas proponitaj por la prelegoj: malkovro de la kinotekniko - kvindeka datreveno de la subskriba ceremonio de la paŭzo de la lasta mondmilito kun studo de la esperanto-movado dum tiu periodo.

Diversaĵoj- Dennis Keefe petas pli grandan murtabulon en unu el la klasĉambroj. La renovigo kaj bru-izolado de alia kursoĉambro estas planigita. La informpaneloj, ĉe la enirejo de la bieno estos refarbitaj.

La kunveno finiĝas je la 13-a horo.

La sekretario: Guy Dairon

LIBRO-SERVO

OFERTO PRI AUKCIO

Bonvolu sendi viajn prezproponojn en la limo de unu monato post la ricevo de la revuo al: S-ino J. VINCENT, 26bis rue de Milngavie 49150 BAUGE

	Baza prezo	Stato
La avarulo (Molière/Meyer) 1907	20 ff	Uzita
La rabistoj (Schiller/Zamenhof) 1928	20 ff	Uzita
Fundamento (franca eldono) 1931	15 ff	Kvazaŭ nova
Dictionnaire Esp.Fr. (Grosjean-Maupin) 1,35	20 ff	Kvazaŭ nova
Quelques mots à ceux qui viennent d'apprendre l'Esperanto (Rollet de l'Isle)	5 ff	Kvazaŭ nova

La libroj estos senditaj afrankite.
La tuta profito de tiu aŭkcio iros al la fonduso Infan-Renkonto.

GRAMATIKO PER BONHUMORO

Post ESTI kaj IGI : ĉu **A** ? ĉu **E** ?

KUN subjekto, oni havas adjektivon **A** por esprimi kvaliton :

— tiu ekskurso estas danĝer**a**

— lia flegado iĝas urĝ**a**

SEN subjekto, oni havas adverbon **E** por esprimi impreson, kiun oni sentas :


— estas malhele en la ĉambro

— subite iĝis malvarme en la domo

RIM :

— la adjektivo rilatas al la substantivo

— la adverbo rilatas al la verbo



Ne kredeble, ke nur kelkaj decibeloj igas vin tiom nervoza.



Ĉu vi povus paroli pli laùte, sinjoro ? La Kantistino estas iom bruema. Mi aldonos al la menuo du orel-ŝtopilojn.



Vi konstruis tion tre sukcese.Vi tiel lerte laboras, ke vi certe mem flikos perfekte viajn ŝtrumpetojn.

Niaj perantoj

Aûstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (250 aûstr. ŝil.).

Belgio : Eldonejo Librejo Sonorilo vzw Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk - Pĉk : 000.0152140-44 (560 B.F.).

Britujo : John C. Rapley, 17 The Grange, Shepherdswell, Dover, Kent CT 15 7 Q B.

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (90 kronoj).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (70 mk.).

Germanujo : Annelis Rudolf, DACHSBERGSTRASSE, 1 W 3507 BAUNATAL pĉk. Frankfurt (M. 2759 35-609) (25 D.M.).

Hispanio : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10e-D 03003 ALICANTE - (1 700 peset.).

Italio : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura Foiro (20.000 liroj).

Japanio : S-ro Tara Nišiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôziŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2700 jenoj - aerpoŝte : 3250 jenoj).

Nederlando : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DEN HAAG poŝtkonto : 39743. (28 fl.).

Nov-Zelando : Sino Gwenda Sutton, 12 c Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1 (aerpoŝte : 18 n.z.dol).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, ul. Krucza 38/42 00512 VARSOVIO (15 us. dol.).

Portugalio : Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joâo Couto, 6, R/C-A - 1500 Lisboâ (2.800 esk.).

Svedujo : Sveda Esperanto-Asocio, Södra Rörum, pl. 455, S-242 94 Hörby - p.k. : 2012-3 (80 kr.).

Svislando : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (20 frs).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol. - aerpoŝte : 20 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aû 25 internaciaj respondku ponoj. Aerpoŝte : 20 us. dol.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, F - 49150 BAUGÉ. — Tél. 41-89-10-34

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier. — N° C.P.P.A.P. 71.404 Le Gérant : P. BABIN